

ŜUSTR 25 JAROJN PREZIDAS LA KLUBON!

Iam vi ŝajnis al mi stranga.  
Pardonon, nome eĉ tre granda.  
Kia vi tiel multe kreskis?  
Iam vi por mi frenda estis,  
jes, vi, sinjoro prezidanto,  
simile kiel Esperanto.

Nun mian frunton kovrus nubo,  
se vi nur mankus en la klubo,  
se vi malsanus – ne, neeble!  
Mi vin bezonas tie nepre!  
Vi, hom’ unika...en konvinko.  
Min same gajnis nia lingvo.  
Eli Urbanová

REGIONA KONFERENCO EN OLOMOUC. La 7-an – 8-an de januaro 1956. La X-an jubilean laborkonferencon en Olomouc partoprenis 153 delegitoj el 43 lokoj de nia respubliko kaj du eksterlandaj gastoj – reprezentantoj de Jugoslavia Esperanto-Federacio redaktoro de „Kontakto“ Matko Dobčnik kaj Ivanka Kočevar, ambaŭ el Celje.

La seminario, kiu estis aranĝita de post la 3-a de januaro, elĉerpis plurajn gravajn temojn kaj multon donis al ĉiu partopreninto. Prologis sinsekve Stanislav Římský, Miloš Rudolf kaj Dro Vladimír Mohapl. Sabatvespere la de januaro kolektiĝis pli ol 200 ĉeestintoj ĉe ARTA VESPERO, entrepreno inda por tutŝtata kongreso. Artistoj de la ŝtata opero en Olomouc Zd. Švehla, Draž. Královcová, Vl. Ott kaj muzikestro Karel Moor prezentis ĉefe en Esperanto juvelojn el operoj de Dvořák, Smetana, Puccini, Bizet, Verdi. El gramofondiskoj ni aŭdis ariojn kaj duetojn el la opero „Vendita fianĉino“, kiun post kelkaj semajnoj aŭdos Esperantjo el la sendstacio Romo. Jiří Švec sub sia gitarakompane kantis „Nelly Gray“. Specialan aplaŭdon rikoltis la plej junaj membroj de la Junuaro en Olomouc, gefratoj Frant. kaj Marinja Rek, pro siaj muzikkontribuoj ksilofonaj kaj pianaj. S-ano Stan. Římský enkonduke konigis la gloran historion de la gastiganta urbo Olomouc. Per aplaŭdego kaj bukedoj esprimis la ĉeestintoj sian dankon al ĉiuj artistoj, precipe al s-ano Zdeněk Švehla, kiu la programon majstre preparis. Reĝisoro de la neforgesebla vespero estis s-ano Miloš Rudolf. Dimanĉe sperto prezidis la laborkonferencon la prezidanto de EK en Olomouc, s-ano D-ro Vlad. Mohapl, kiu post bonvenigo kaj kanto de simpatia naŭjara D. Parůžková el Rýmařov skizis la bildon de la movado dum la dekjara periodo. Sekvis parolado de la prezidanto de komuna laborkomitato s-no Vlad.Slaný, Referato de la prezidanto de TKKE, s-ano Josef Vítek, donis novajn prespektivojn. En la nomo de jugoslaviaj esperantistoj salutis la konferencon s-ano M. Dobčnik kaj informis pri la movado en sia ŝtato. S-ana Ed. V. Tvarožek raportis pri la malfavoraj cirkostancoj en Slovakio. En diskuto partoprenis 19 gesamideanoj kun vere atentigaj kaj gravaj rimarkoj. La konferencon formis kaj dankis la aranĝantoj pro la modela laboro s-ano J. Vítek. Per komuna kanto de LA ESPERO estis la fruktodona konferenco finita.

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26, je la 20-a horo.

Programo:

29. 2. VLASTIMIL NOVOBILSKÝ: Vizito ĉe niaj majstroj.

7. 3. FRANTIŠEK OMEĽKA /OTROKOVICE/: „Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondon“ /historia romano, kiun mi verkas/.

a/ kiel mi havigis al mi historian materialon,

b/ enhavo de la libro.

14.3. Dro TOMÁŠ PUMPR: Kiel mi traduku tangon. Kun akompano de s-ano Ŝmejál /gitaro/ kaj membroj de la junularo.

21.3. JOSEF VONDROUŠEK /BRNO/: Ekspedicio en steloj notita /Jason al Kolĥido/.

28.3. Dro JOSEF FAJGL /ZLONICE/: Ĵus mi vizitis Varsovion kaj ĝiajn esperantistojn.

4.4. MILOŠ LUKÁŠ /HRADEC KRÁLOVÉ/: Kiel helpis min Esperanto dum mia preskaŭ duoncetjara praktikado de ĝi.

11.4. ARTVESPERO DE VERDA ĈARO DE JULIO BAGHY HONORE AL LA MAJSTRO.

18.4. Dro JAROMÍR JERMÁŘ: Hodiaŭa situacio de neesperantistaj lingvaj projektoj kaj nia rilato al ili.

25.4. MILOŠ RUDOLF /OLOMOUC/: Ekspedicio Kon-Tiki.

2.5. FRANTIŠEK PYTLOUN /PODĚBRADY/: Esperanto kiel nervkuracilo.

9.5. Ŝtata tago ĉeĥoslovaka.

16.5. THEODOR KILIAN /TŘEBÍČ/: La okupo de la militkaptitoj en Tomsk-Siberio.

23.5. LADISLAV KYNĈL: Deveno de la vegetalaj kuriozaĵoj.

30.5. JIŘÍ PASTOR: Novaĵoj de elektroteknika industrio.

- - -

**G R A V A A T E N T I G O!**

„MARYŠA“ – teatra dramo de fratoj Mrštík-en Esperanto! La 11-an de aprilo prezentos ĝin artisma kolektivo de Esperantista Klubo en Praha VERDA ĈARO de Julio Baghy. Detala programo en nia aprila numero!

LA VERDA ĈARO de Julio Baghy petas ĉiujn, kiujn interesiĝas pri ĝia laboro, ke ili partoprenu ĝian laborkunvenon la 9-an de marto /20-22a horo/ en la kluba kunvenejo en Smečky. Ni rakontos al vi pri nia laboro kaj petos viajn konsilojn kaj helpon. Venu certe kaj multnombre, ni kore invitas vin kaj ĝojas je renkontiĝo kun nia publiko kaj kunlaborantoj.

Per la „Verda ĉaro“: Eva Suchardová

KOMITATANOJ DE LA KLUBO kunvenos la 23-an de marto /19-22a horo, klubejo/. Notu la daton kaj horon, ne venos speciala invitilo!

ĜENERALA KUNVENO DE LA KLUBO okazos dimanĉe la 15-an de aprilo /9,30-12a horo/ en la klubejo. Ĉiu membro notu tiun ĉi gravan daton kaj nepre venu!

- - - -

**NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ.**

ALFRED BOROVSÝ, banka konsilisto, unu el plej malnovaj esperantistoj ĉeĥaj kaj fondinta membro de la EK en Praha mortis 82-jara en majo 1955 en Praha. Ĝis sia morto li interesiĝis pri Esp-o firme kredante je ĝia venko. Honoron al lia memoro!

-

Emerita instruistino MARIE FUĈKOVÁ el Valašské Klobouky, longjara membro de nia Klubo mortis la 24-an de decembro 1955. Honoron al ŝia memoro!

-

AITARO YAMANOI mortis! La nekrologon pri lia forpaso ni legas en la lasta pasintjara numero de „La Revuo Orienta“. Al multaj malnovaj ĉeĥaj esperantistoj estis Aitaro Yamanoi kontata kiel granda amiko de ĉeĥa popolo kaj ĝia literaturo – japano, kiu majstris ĉeĥan lingvon kaj mirigis ĉeĥajn esperantistojn per sia ĉeĥe skribita leteraro. Li ne plu vivas, sed ĝis lastaj horoj de sia vivo li okupiĝis pri gravaj tradukaj laboroj el Ĉeĥoslovaka Antologio. Li ripozu en paco!

### **Praha-ek-1956-34\_35-03**

BULTENO PRAHA 34-35 1956

- 03 -

GEEDZIĜO: S-ano Karel JANDA el Jihlava kaj s-anino Libuše BEZLOJOVÁ el Kralupy n.Vlt. geedziĝis la 21-an de januaro 1956. Ili konatiĝis pasintjare dum la Somera Kolegio de Esperanto en Doksy. Multan feliĉon!

ESPERANTISTA KLUBO en PRAHA.

SOMERA KOLEGIO de ESPERANTO DOKSY.

--

JAROSLAV DOLANSKÝ en Hradec Králové festas sian 50-jariĝon! Li fariĝis esperantisto dum siaj studentaj jaroj kaj post la partopreno en Universala Kongreso li decidiĝis neniam forlasi nian movadon. Lia laboro por Esperanto estas vere grandega kaj ĉiam oferplena. Tuj post la dua mondmilito li eldonis la konatajn baldaŭ elĉerpitajn ampleksajn vortarojn de fratoj Filip. Por la Klubo en Hradec Králové li fariĝis granda mecenato. Ni menciuj nur la presitan kluban organon kaj sennombrajn presaĵojn, kiuj famigis la klubon. Longajn jarojn li prezidis la klubon aŭ estis ĝia fervora sekretario. Kun sia ŝatata edzino li restas fidela la nia granda ideo kaj restas ankaŭ nun unu el la ĉefaj gvidantoj en la metropola urbo Hradec Králové. Al nia longjara kunlaboranto ni deziras sanon kaj feliĉon!

EK Praha, FP, -jelĉ-

--

RICHARD JURKA 50-jara. Nia vigla amiko Richard Jůrka kaj kun li la esperantistoj de Přerov festis la 6-an de decembro lian 50-an naskiĝtagon. Nian sinceran gratulon!

--

JAROSLAV ŠUSTR dankas! Okaze de 25-a datreveno de nia prezidantiĝo mi ricevis tiom da bondeziroj, esprimoj de simpatioj, eĉ donacoj, ke mi estis ne nur embarasita, sed ankaŭ tre kortuŝita. Dankon al vi ĉiuj, karaj gesamideanoj! Dankon al ĉiuj konatuloj! Apartan dankon al la nekonataj bondezirantoj! Akceptu mian sinceran dankon per ĉi tiu vojo! Amaso da esperantistaj laboruj malhelpas min respondi al ĉiu aparte! – Ni ĉiuj tion vidas, ni ĉiuj tion sentas, ni ĉiuj tion sperte, ke esperanta afero eniris novan epokon! Malfermiĝas novaj eblecoj, novaj perspektivoj, aperas novaj sukcesoj. La mondo ĉiam pli serioze rigardas nian movadon. Des pli diligentaj, laboremaj kaj fidelaj ni devas esti hodiaŭ. La laboro de niaj oferemaj antaŭuloj kaj la laboro nia, kiu daŭras jam jardekojn, ne estis vanaj! Sed la fina venko ankoraŭ ne estis atingita. Mi firme kredas, ke ĉiu el vi kun novaj kvantoj da entuziasmo helpos atingi ĝin! Ek al la laboro!

Jaroslav Š u s t r ,  
prezidanto de Esp. Klubo en Praha.

KIO OKAZIS, KION NI AŬDIS, KION NI LEGIS, NI INFORMAS...

LA MONDO NE HAVAS ATENDEJON. Programrevuo de ĉs.radio „Ĉeskoslovanský rozhlas a televize“ informas en sia n-ro 6/1956 ke la 7-an de februaro estos disaŭdigata la supre nomita dramo de la nederlanda aŭtoro Maurits Dekker. Laŭ la revue tradukis la teatraĵon den ĉeĥan lingvon el Esperanto D-ro Tomáš Pumpr. Ni sincere ĝojas pri tiu nova sukceso de nia membro kaj bedaŭras nur, ke dum la disaŭdigo mem oni ne menciis la esperantan fonton.

--

ESPERANTO EN NIA RADIO. La 12-a de februaro nunjara estas memoranda tago, kiam post 6 jaroj denove aŭdiĝis la vorto „Esperanto“ el ĉeĥoslovaka radio sen iu mallaŭda aldono. Dum „Matenstelo

pionýra, dissendo Destinna por geknaboj ĉeĥoslovakaj, oni raportis pri la japana verko de Hejbonŝa, kie aŭtoroj estos infanoj de la tuta mondo. La „Matenstelo“ alvokis niajn infanojn al kunlaboro, promesis premiojn kaj klarigis, ke bonaj verkaĵoj estos tradukitaj en Esperanton kaj senditaj al Japanio.

--

FUČÍK EN ESPERANTO. Nun nun venis en niajn manojn la dika kaj valora volumo „Almanach Kmene 1948, jarlibro de ĉeĥoslovakaj eldonistoj. Sur pĝ. 217 ni trovas artikolorn de G/usta/ F/učíková/: „Raporto, verkita en maŝo de pendigilo“ pri tiu ĉi fama verko de Julius Fučík, kiu aperis jam en pli ol 60 lingvoj. Ni lega sen ĝi i. a. ke „ekzistas intereso pri traduko kaj eldono de Raporto en Esperanto“. Ni aldonas, ke tiun verkon tradukis s-ano R. Hromada, ke ĝi estis ankaŭ kompostita, sed laŭ plej alta ordono estis la kompostaĵo tiam disĵetita.

### **Praha-ek-1956-34\_35-04**

BULTENO PRAHA 34-35 1956

- 04 -

Tiel okazis, ke ekzistas de tiu traduko laŭ nia scio sole unusola ekzemplero, farita el presprovaĵo. En ledto bandita, ĝi estas fiero de la posedanto.

--

MIECZYSLAW JASTRUN: ADAM MICKIEWICZ. Originala verko en Esperanto pri la granda pola poeto. Ŝtata eldonejo „Polonia“, Varsovio 1955, 78 pĝ, 15 x 20,5 cm, 13 tutpaĝaj ilustraĵoj, laŭ komisiono de Komitato de kulturaj rilatoj kun eksterlando. Kun sincera ĝojo ni prenis en la manojn la plaĉan libron kaj finleginte ĝin kun viva intereso ni konstatis, ke simila plaĉa kaj konciza kaj tamen verko da riĉa instruo pri la fama polo ne ekzistas en nia lingvo. Kun kontento ni rimarkis ankaŭ la bonan lingvon. Salutinda estas ankaŭ la fakto, ke estas la unua Esperanto-libro, aperinta post multaj jaro jen najbara Polujo.

--

BIRDO KAJ AEROPLANO  
„Žežuličko, kde jsi byla?“

Flugis birdo en spiralo  
De la monto al la valo;  
ku-ku! ku-ku!  
ku-ku! ku-ku! ku-ku!

Ĝin renkontis la helico,  
Tre moderna, lasta vico!  
ku-ku! ku-ku!  
ku-ku! ku-ku! ku-ku!

„Via flugo, kara ido –  
tre malfruas je rapido!“  
ku-ku! ku-ku!  
ku-ku! ku-ku! ku-ku!

La kukolo klakis beke  
kaj respondis iom seke:  
ku-ku! ku-ku!  
ku-ku! ku-ku! ku-ku!

„Birdoj flugas jen kun kanto,  
aeroplano - d i l e t a n t o !

ku-ku! ku-ku!

ku-ku! ku-ku! ku-ku!

Ŝtefo U r b a n

„Hirtaj kantoj“

HISPANA REVOLUCIO. En granda ekspozicio, kiu estas aranĝata sub tiu ĉi nomo en Praha, ni partoprenos per Esperanto-materialo, kiun eldonis hispanaj samideanoj dum la bataloj en tiu lando. Ni petas legantojn de nia jBulteno, ke ili al ni sendu prunte ĉion /librou, gazetou, afiŝojn k. s./, kio koncernas tiun ĉi temon. Post fino de la ekspozicio /julio/ ĉiu rericevos en ordo la materialon.

--

INTERNACIAN EKSPOZICION DE INFANDESEGNAĴOJ aranĝos Japana Esperanto-Instituto en Tokio en majo okaze de la 50-jara jubileo de la japana Esperanto-movado. Ni kontribuis al tiu ekspozicio per 25 junulargazetoj, ĉiuj, kiuj aperas en nia lando.

--

SOVETUNIO EKUZIS OFICIALE ESPERANTON. „Sunday Times“, unu el la plej gravaj britaj dimanĉaj gazetoj, komuniké en sia numero de la 22-a de januaro la sesacian novaĵon, ke V. Molotov respondis per telegramo en Esperanto kaj en la angla al „Japana Popola Konsilantaro“. Tiu informo estis konformita en telegramo de Tokio al Londono. La novaĵo vekis grandan interesiĝon en ĉiuj medioj, precipe en tiuj de parlamentanoj kaj diplomatoj, ĉar estas la unua fojo, ke Esperanto estis uzita kiel diplomata lingvo. – Tiun ĉi pli ol sensacian informon alportas februara numero de la revuo „Esperanto“ de UEA. Ĝi konfirmas la Saigon, kiun aŭdis pluraj niaj membroj el radiostacioj Wien kaj Moskva, kiu ŝajnis al ni tiam preskaŭ nekredebla. La aferoj evoluit pli rapide el ni povis antaŭvidi. Ĉio aspektas tiel, ke sen transire sen tagiĝo aperos sur nia Esperanto-ĉielo brilanta suno. Ni atendu trankvile, kun levita kapo, pliajn signoj de progreso.

--

ESPERANTO EN POLA RADIO. Se vi deziras ĝin aŭskulti, skribu al „Pola radio, Eksterlanda fako, Warszawa“ kaj petu tie Esperanto-disaŭdigon!



PRI ŜVEJK aperis en januara n-ro de la revuo „Esperanto de UEA“ longa artikolo „Libro, kiu vekis kaj ridigis la mondon“. Verkis ĝin nia membro O. Ginz.

--

PRI HEROLDO DE ESPERANTO alvenas ĉiutage novaj kaj novaj leteroj de pasintaj legantoj kaj de novaj interesuloj. Ni neniel sukcesos respondi ĉiujn kaj ni petas, ke oni relegu nian noton pri „Heroldo“ en pasinta Bulteno. Al kiu ni povas liveri tiun revuon dum 1956, tiu ricevis aŭ ricevos pagilon kun koncerna noto. En okazo de intereso sendu al ni pagon tuj. Ni estos dankaj, se vi ne deziras ricevi „Heroldon“ en 1956. Ni devas aranĝi la distribuon en plej proksima tempo. Al nro 17 ni almetis pagilon. Kiu ne sendis jam monon, apenaŭ povos ricevadi Hroldon dum 1956.

--

INTERNACIA GEOGRAFA ASOCIO. Dum la 40-a Universala Kongreso de Esperanto en Bolonjo estis fondita Internacia Geografia Asocio. Ĉeĥoslovakion en ĝi reprezentas s-ano Ing. Štefan Veselý. Ĉiuj interesuloj pri IGA skribu al s-ano Veselý /Martin, Hviezdoslavova ul. 2/III./ La konata geografia organo ĉeĥoslovaka „Lidé a země“ en sia venonta numero publikigos kelkajn informojn ĉerpitajn el la Bulteno de IGA.

--

UNUIĜINTAJ NACIOJ, la 13-an de januaro 1956. „Mi konigas ricevon de via „Bulteno“, kiun mi tralegis kun granda intereso, kaj atento. Mi trem iris pri la kuraĝigaj novaĵoj kaj estimas vian bonŝancon. Vi certe meritas la rezultojn pro viaj senlaciaj klopodoj, por kiuj mi vin gratulegas. Amike M Campan.“ – Similaj ĝojigaj leteroj kaj kartoj amasiĝas sur nia redakcia tablo el plej diversaj mondpartoj, kien direktiĝas ĉiu numero de nia Bulteno. Speciale karaj al ni estas tiuj de niaj amikoj el Sovetunio, kien al kelkdekoj da adreso ni la Bultenon sendas. Same ĝoje ni konstatas, ke pluraj Esperanto-gazetoj ĉerpas el nia Bulteno kaj ne forgesas mencii la fonton. Evidentiĝas, ke nia Bulteno jam tri jarojn plenumas sian gravan taskon de serioza informilo.

!!

ĈU VI VOLAS REGULE RICEVADI NIAN BULTENON? Tiam senprokraste renovigu vian membrecon en nia klubo aŭ estiĝu ĝia membro. Vi scias, ke ĝi estas senpage sendata al ĉiu membro de nia klubo. Petu la poke ĝi estas senpage sendata al ĉiu membro de nia klubo. Petu la poŝtpagilon de la kasistino s-anino Anĉi Bárochová, Sokolská 17, Praha II.

--

LA BRILAJ ĈEĤOSLOVAKAJ INSIGNOJ ESPERANTISTAJ, faritaj laŭ la desegnaĵo de nia membro Dolfa Bartošík /Ĉs.flago, super ĝi verda stelo/ ankoraŭ haveblaj po 4 Kĉs.

--

BELA BUSTO DE NIA MAJSTRO de akademia skulptisto Josef Paša, 16 cm alta, bakita argilo, havebla po 30 Kĉs /per poŝto 36 Kĉs/.

-----  
A N T A Ŭ S I G N O J

/El la poemaro „Jarsezonoj“/  
Urbo en nokto; la lun’ ne lumas;  
kamenaj tuboj fajreras, neĝas;

nigregoj, kuŝas sur doma aro,  
Nigregoj, nokto kaj februaro.

Nur ĝojaj lampoj ne ĉesas brili:  
la lampoj, steloj, lanternoj, ili.

Kaj hundoj, kiuj en ombro bojas,  
min ne ekscitas: jen mi ja ĝojas,

ĉar ie tie en nokt’ kaj tempo



atende staras jam la PRINTEMPO!  
Karolo Píč

--

INFORMO NEPRE TRE GRAVA!  
/El la letero de s-ano Mgr. M. Dydak, Bielsko-Biala, Pollando./

...Vi certe aŭdis, ke la tatempe estis kontraktita la konvencio inter pola kaj ĉeĥoslovaka registaroj en la afero de turisma movado. Laŭ tiu ĉi konvencio ĉsl. kaj polaj turistoj povas viziti certajn apudlimajn lokaĵojn en Tatry kaj Pieniny, posedante turistajn legitimilojn kaj enirpermesojn. En Bielsko-Biala oni povas vidi dum ĉiuj sabato kaj dimanĉo ĉsl. turistojn. Mi supozas, ke post baldaŭa tempo ankaŭ ĉsl. kaj polaj geesperantistoj povos organizi renkontiĝon en unu el tiuj apudlimaj lokoj. Mi kaj ankaŭ aliaj Bielskaj geesperantistoj tre ĝojus gastigi viaŝtatajn geesperantistojn en mia urbo...

VERDA VOĈO DE DOKSY

SALUTO AL POETO

/Al Karolo Píĉ/

Vivas viro  
kies koro  
al beleco emas  
kaj poemas,  
sentojn veŝas,  
rimojn versas  
kaj amemo  
ne estas ĉe li en anatemo.

Jen mi dozas mian guton  
kaj sendas al li saluton

Lia verko  
kresku kiel kvarko.  
Lia tago,  
ĉu surtero, ĉu sur /Mácha/-lago  
estas por li ovo,  
kiu sen kovo  
de kokino  
gvidas en al kokido, sed al Georgino  
/ĉu al vera,  
ĉu nure poet-ĥimera  
post vino?/  
Ŝi ne fariĝu orfino,  
por ke ne ploru ŝia kor' sentema,  
ĉar poeto eble restus sen tema!  
Li ja devas veni al or-fino!  
/Rimeĵo nura de Adolf Staňura/

--

KAJ KIO NUN?

En lasta tempo venas pli kaj pli ĝojigas sciigoj pri Esperanto. La sukcesa triumfo ĉe Unesko, ĝia reviviĝo en Soveti, prove ĝi estas instruata en diversaj lernejoj en multaj landoj, ĉiam pli kaj pli uzas ĝin diversaj radiostacioj, ankaŭ en filmon ĝi penetras kaj laŭ lasta sciigo ĝi estis jam uzita unuafoje kiel diplomata lingvo inter Sovetio kaj Japanujo.

Kaj kio nun? Ĉu ni estas sufiĉe preparitaj por eventuala venko, kiun ni ĉiuj sopiras, pri kiu ni ĉiuj laboras? Ĉu ni estas sufiĉe sperte ankaŭ en praktika laboro ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto?

Ni devas esti realaj, ĉar realo ni devas ankaŭ vivi. Dum miaj societa, asocia, kursa kaj radia laboruj mi multon sperte. Pli multaj inter ni restas nur entuziasmuloj, ne praktikuloj. Multaj estas eĉ tiaj, kiuj pro entuziasmo al nia lingvo ĝin eĉ ne profunde lernas, por ili sufiĉas admiri ĝin kaj propagandi. Kaj ofte tia propagando eĉ malutilas. Oni ofte rigardas nin stranguloj.

Venas rapide la momento, kiam oni demandos nin: „Ĉu vi estas kapablaj plenumi la devon, kiuj ekestas por oficiala enkonduko de Esperanto kiel lingvo internacia?“

NI DEVAS ESTI PREPARITAJ! Ankaŭ nunjare okazos Somera kolegio de Esperanto en Doksy. Ĝi okazos de 15. ĝis 29. VIII. 1956. Detalaj informoj estos publikitaj. Jam nun pripensu vian libertempon! Estos por vi ĝue uzi libertempon en Doksy, en alloga regiono kun granda lago kaj samtempe tie perfektigi en via lingvoscio.

Ant. Slanina

ESPERANTO EN NIA RESPUBLIKO /laŭ la raportoj al nia redakcio/.

**BRNO:**

Kelkaj sukcesaj kursoj, gvidataj de s-ano Josef Vondroušek. Pri la regiona kunveno kun la tradicia kluba maskovalo de la Junularo la 11-12-an de februaro ne atingis nin la raporto.

**ČESKÉ BUDĚJOVICE:**

Entute kvar kursoj kun 85 interesuloj, kvankam la situacio de la rondeto ĉe ZK ne multe pliboniĝis.

**JAKARTOVICE:**

Infana Esperanto-rondeto kun unujara tradicio. Gvidas s-ano Jaroslav Hadámek.

**NETOLICE:**

Kurso por komencantoj, 26 lernantoj instruas s-ano Nymburský el České Budějovice.

**OLOMOUC:**

Kurs opor komencantoj nun en filizofia fakultato ĉiulunde. Instruas s-anino N. Pokorná.

**OPAVA:**

Kurson por komencantoj vizitas 18 gelernantoj. Gvidas s-ano Vlast. Kočvara. Krome daŭriga kurso por 8 infanoj. Depost januaro nova kurs opor geaktoroj de la loka teatro.

**OSTRAVA:**

En kadro de ZK VŽKG entute 4 kursoj, ĉiuj merkrede. Du el ili por komencantoj. Kursgvidantoj s-anoj: V. Slaný, Zd. Raška, J. Čermák kaj Drah. Kočvara.

**OSTRAVA-HRABŮVKA:**

En OUPZ n-ro 11 25 komencantoj en la kurso gvidata de Drah. Kočvara.

**OSTRAVA-MAR. HORY:**

Kurson por 10 komencantoj gvidas s-ano Vl. Slaný.

**PÍSEK.**

Ĉiumarde kaj vendrede de post mezo de decembro kurso en ZK Jitex, Jungmannova str. Gvidas s-ano Křivánek.

**PODĚBRADY:**

De post la 21-a de februaro kurs opor komencantoj. Perfektigan kurson, kiu startas la 23-an de februaro, gvidos s-ano A. Nozár. La rondeto regule kunvenadas enejo de O. L. knihovna laŭ nia pasintnumera raporto.

**STĚBOŘICE:**

Esperanto-rondeton de la mezlernejo gvidas s-ano Křístek.

**TŘEBÍČ:**

Kurso por komencantoj. Gvidas s-anoj Bl. Daňhelová kaj Zd. Polnauoravá. Kurso perfektiga kaj kurso konversacia. Ambaŭ gvidas s-ano Theodor Kilian.

VÍTKOV:

Kurso por komencantoj de post januaro, gvidata de s-ano Jar. Škařupa.

ŽDÁR NAD SÁZAVOU:

Petas pri prunta alsendo de propagandmaterialo por la ekspozicio. Adreso: s-ano Gustav Kremláček, Stanlingrad 15/3, Žďár nad Sázavou.

---

ĈIUSEMAJNE 25 RADIOSTACIOJ ELSENDAS PROGRAMOJN EN ESPERANTO. Ĉu vi, kara leganto, aŭskultas almenaŭ unufoje semajne por plilarĝigi viajn sciojn?

---

GRAVAJ TELEFONNUMEROJ:

Esperantista klubo /s-ano Jar. Šustr/ 63 464

Redakcio de la Bulteno /Josef Vítek/ 23 83 23

-----  
Laŭbezone eldonas Esperantista Klubo ĉe Osvětová Beseda en Praha 2.

Koresponda adreso: Jaroslav Šustr, Dlouhá tř. 10, Praha I.

Respondecas pri la enhavo: Josef Vítek, Jungmannova 24/I., Praha II.